

# TEA-BULTENO

19<sup>A</sup> JARO - N<sup>o</sup> 130

MARTO - APRILO

N. 3-4/2016

Poezio estas arto enigi maron en glason.

*Italo Calvino, verkisto, (Santiago de las Vegas, Cuba 1923 - Siena 1985)*

## Jara Asembleo de TEA dimanĉon la 7<sup>an</sup> de februaro 2016

### Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocioj, karaj geamikoj,

Jaroj flugas rapidege, estis antaŭhieraŭ la jaro 2000, estis hieraŭ la jaro 2006, kiam ni celebris, verdire tre bone kaj eĉ pompe, la 100<sup>an</sup> datrevenon de nia TEA. Kaj ĉi-jare ni jam festas ĝian 110<sup>an</sup>, verŝajne ne tiom pompe kiel tiam, sed tutcerte same bele kaj interese.

La antaŭ nelonge finita 2015 estis jaro sufiĉe kontentiga: finiĝis nia eŭropa projekto "Elloke tutmonden, la novaj defioj por volontulado" sukcese, kvankam tre laborige. Ni plenumis ĉiujn postulojn de Eŭropa Unio kaj la 24<sup>an</sup> de decembro ni ricevis la finan parton de la subvencio. Verdire, tiam, mi pli bone spiris kaj trankviliĝis. Estus bone kaj interese partopreni en alia eŭropa projekto, ni pristudu la eblecojn por sukcesi.

Mi ne resumos kion ni faris en 2015, nia tre preciza sekretariino tre bone listigos al vi nian tutan agadon. Nur kelkajn vortojn miaflanke.

Mi jam diris pasintfoje ke nia Asocio velkas, ke ĝi bezonas novajn fortojn! Sed la formulon por tion realigi, mi ne konas. Niaj ĉefaj celoj estas:

- disvastigi Esperanton, kaj tion ni faras plurmaniere kaj plurloke;
- instrui esperanton, kaj tion ni preskaŭ ne sukcesas;

- akiri novajn membrojn, kaj tion same ni ne sukcesas.

El tiuj tri celoj, ni trafis nur unu. Vi konsentos kun mi, ke tio ĉi ne sufiĉas.

Pri kio ni eraris? Kion ni estus povintaj fari, kaj ne faris? Al vi elmeti kritikojn kaj respondojn, konscie ke poste vi agu konsekvence: tio estas pli aktive kunlabori, viziti pli ofte la kunvenojn, de tempo al tempo proponi vin por reĝisorado de iu vespero aŭ por helpo en instruado de Esperanto, se bezonate.

Ni komprenu ke sen novaj fortoj, sen pli junaj kunlaborantoj, nia Asocio estas destinita malaperi. Ne morgaŭ, eble eĉ ne postmorgaŭ, sed relative baldaŭ. Ĉiukaze la tempo ne laboras favore al ni.

TEA troviĝas nun en sia 110<sup>a</sup> oficiala vivojaro. Kiom da laboro, kiom da bona kaj valora agado estis faritaj ĝis nun! Se vi havus la paciencon tralegi la pasintajn revuojn, aŭ trafoliumi niajn arkivojn kaj eĉ nian Bultenon, vi povos konstati, kiom niaj antaŭuloj kaj ni sukcesis realigi. Pri la plejparto, ni forgesis, ni jam forviŝis el la memoro la belajn kaj gravajn sukcesojn. Ni havas la impreson, ke nenio aŭ malmulte estis farita, sed tiu impresado estas komplete erara. Ni faris multege! Kaj tiu granda, amasa laboro ne povas konduki nin al forvoriĝo en la venontaj jaroj!

Ni devas, ĉiuj kune, ĉiu laŭ sia eblo, strebi por plua riĉa vivo de nia asocio, por ĝia loko en la nacia Esperantomovado, por teni sian pozicion en la mondo. Ni posedas enviindan heredaĵon, historian materialon, bibliotekon: TEA ne povas kaj ne devas malaperi.

Pasintjare mi menciis belan revon: krei iaspecan urban, aŭ regionan, muzeon, aŭ kulturen centron esperantistan, kie niaj riĉaĵoj povu esti je dispono de niaj posteuloj. Sed kie, kiamaniere? Ĉu iu el vi povus ion sugesti?

Ankoraŭ iom da tempo disponeblas por renversi la situacion, kaj permesi al TEA daŭrigi sian vojon al celebrado de la 200<sup>a</sup> datreveno.

Ni ne komplete malesperu, la estonteco estas nekonata: morgaŭ, postmorgaŭ povus aperi ŝanco por tio kaj ni estu pretaj kapti ĝin.

Je la fino de tiu ĉi "morala raporto", pardonu min pro ripetado de tio kion mi diris pasintjare: *antaŭ multaj, multaj jaroj, okaze de la unua itala kongreso en Triesto, oni kreis belan bildon kun slogano: "la estonto estas nia"! Mi ne scias, ĉu vere estos tiel, verŝajne ne, sed espero estas la lasta formorti. Kaj kiel bonaj sekvantoj de Zamenhof, ni ESPERAS, malgraŭ ĉio, ĝis la lasta spiro."*

Vivu TEA kaj Esperanto!

*Edvige Tantin Ackermann*

## Agadraporto de la sekretario

Tre estimataj kaj karaj TEA-anoj!

Denove ni renkontiĝas por la Jara Asembleo kaj por kune rememori la pasintjaran TEA-aktivadon.

Unue ni konsideru la disvolviĝon de la jam bone konata **Projekto Grundtvig**: ELLOKE TUTMONDEN: LA DEFIOJ DE VOLONTULADO, kies unua seminario okazis ĝuste en Triesto, oktobro 2013. La tuto finiĝis per la Seminario en Vercelli, de la 28<sup>a</sup> ĝis la 31<sup>a</sup> de marto 2015. Post ĝi nia prezidanto ekokupiĝis pri la tre grava kaj malfacila tasko prezenti la finan raporton pri la tuta evento al la Nacia Agentejo. Mi memorigas al vi, ke en la projekto partoprenis 6 partneroj: el Francio, Litovio, Skotlando, Pollando kaj 2 el Italio. Ĉiu partnero havis la taskon organizi instru-seminariojn kaj ankaŭ kompreneble partopreni en ili, sinsekve en la diversaj landoj. Ĉefa celo estis plikapabligo kaj profesiigo de la personoj por pli efika agado precipe sur la loka kampo.

**Junie/julie** - Kadre de alia **Projekto Grundtvig**, pri interŝanĝo de Esperanto-instruistoj el Italio kaj Pollando, junie/julie Elda, Cristiana Doerfler kaj Renata Damiani, estis en Bjaliŝtoko kaj Supraŝl, por prelegoj kaj kursoj.

**Aŭguste** - Dimanĉon la 30<sup>an</sup>, en la ĝardeno de Villa Engelmann, ni partoprenis en la aranĝo zorgita de Gabriella Valera Gruber, de la Asocio "Poezio kaj Solidareco", kaj legis poezi-aĵon de Ottavio Gruber en la triesta dialekto kaj Esperanto.

**Septembre** - La 26<sup>an</sup> tri triestanoj kune kun Ostoj Kristan el Ljubljana propagandis Esperanton dum la aranĝo "Eŭropa Festo de la Lingvoj" en Koper, Slovenio, organizita de Ludovica Piccinini, el la Asocio PINA por Kulturo kaj Edukado. Plurspeca materialo estis portita - gramatikoj, libroj, propagandiloj ks - por prezentado de la internacia lingvo. En apuda ejo estis montrita filmo pri Esperanto.

**Oktobre** - Finfine estis eldonita de LUGLIO-PRINT "Kiam ekfloras la migdalarbo...", libro pri poeziaĵoj en triesta dialekto tradukitaj al Esperanto. Entute temas pri 26 verkoj de sep triestaj aŭtoroj. La 16<sup>an</sup> de januaro 2016 oni prezentis ĝin ĉe la Librejo LUGLIO en *Galleria Rossoni*.

**Novembre** - Ankaŭ en 2015 Alessandro Soranzo monsubtenis la organizadon de Konkurso pri pentraĵoj dulingvaj, titolita "Premio Lilliana Cernacca Soranzo", dediĉe al lia patrino. Por partopreni en la konkurso, la verkoj, faritaj per iu ajn tekniko, devis enhavi almenaŭ unu vorton en Esperanto skribitan per verda kolorilo, kun traduko al nacia lingvo, elektita de la aŭtoro mem kaj skribita alikolore. Bedaŭrinde, kompare kun la pasinta jaro, la alvenintaj pentraĵoj malmultis: alvenis entute

dek du pentraĵoj el italaj regionoj Friulo Juli-Venetio kaj Tuskanio, Slovenio kaj Serbio. La inaŭguro okazis la 28<sup>an</sup> de novembro, dum la premi-transdonado la 5<sup>an</sup> de decembro. La ĵurio konsistis el Renata Damiani - pentristino kaj skulptistino, Alessia Favretto - psikologino, kaj Oscar Garcia Murga - mediisto. Ĝia unuanima decido estis: 1<sup>a</sup> premio - nealjuĝita; 2<sup>a</sup> premio, egalmerite, aljuĝita al Aredo Bossi, Trieste, kaj Kovács Pécsai Emese, Subotica, Serbio; 3<sup>a</sup> premio, egalmerite, al Giorgio Predonzan, Trieste, kaj Blanka László, Subotica, Serbio. La speciala premio por geknaboj ne estis donita, pro manko de konkurantoj, tamen la ĵurio juĝis inda je agnosko la verkon de la juna aŭtoro David László, ankaŭ el Serbio, kiu ricevis Specialan Mencion kaj la monsumon de 50 €.

**Novembre** - De la 27<sup>a</sup> de novembro 2015 ĝis la 12<sup>a</sup> de januaro 2016 oni muntis malgrandan ekspozicion, en la TEA-sidejo, per Kristnaskaj desegnaĵoj el la 2014<sup>a</sup> jaro.

**Enklubaj programoj:** Dum la mardoj oni precipe ordigis la sidejon, dum en la vendredoj oni klopodis allogi TEA-anojn per diverstemaj prezentaĵoj. Okazis spektado de fotoj pri la pentro- kaj skulpto-verkoj de Renata Damiani fare de MariaGrazia Mora; de filmoj pri Esperanto kaj pri Alasko, fare de Edvige Ackermann; de fotoj pri Skotlando kaj Litovio, landoj kie okazis la Grundtvig-seminarioj; kaj pri la „Malnova Triesto“, el la poŝtkarta kolekto de nia asocio Giuseppe Valle. Marija Beloŝeviĉ prelegis pri „Kroata Heredaĵo en Unesko-listo“. Foje oni sindediĉis al studado de la lingvo, trafoliumante PIV-on serĉe de nekonataj vortoj, aŭskultis raportojn pri la Grundtvig-seminarioj, rememoris la italan esperantistinon kaj poetinon Clelia Conterno Guglieminetti; kune klopodis traduki poezi-aĵojn cele la eldonon de la libro „Kiam ekfloras la migdalarbo...“. Estis legitaj rakonto el la libro "Inter Amikoj" de la israela Amos Oz, en la traduko de Amri Wandel; artikolo de Carlo Minnaja pri Bruno Migliorini; prelego de Davide Astori titolita "Poesia" kaj oni komencis esplori la imponan verkon "Historio de la Esperanta Literaturo", de C. Minnaja kaj G. Silfer. Fine de junio okazis la "Somera Festo" kaj je la 18<sup>a</sup> de julio, tiu ĉe Anita; decembre, gaja kuntostado antaŭ Kristnasko kaj Jarfino.

**Esperantistaj gastoj en Triesto:** dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, James Rezende Piton kaj Eida Lima, ambaŭ el Brazilo, Folkmar Keller el Vieno kaj Fany Rižnar el Izola.

**Pri kongresoj/konferencoj/renkontiĝoj.** Marte/Aprile Elena partoprenis en la 8<sup>a</sup> Mezorienta E-Kongreso, en Hammamed, Tunizio; julie, en la Lilla UK, ĉeestis Barbara, Edvige,

Elda kaj Elena; septembre, ni grimpis sur la Trilandan Pinton por la tradicia Festo de Amikeco; oktobre, de la 9<sup>a</sup> ĝis la 11<sup>a</sup>, ni estis en Opatija, Kroatio, por la 18<sup>a</sup> Alp-Adria Esperanto-Konferenco, kies ĝenerala sekretario estas Edvige Ackermann.

**Pri ekstera informado:** Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj, ĵurnaloj kaj precipe rete.

**Alirprogramoj de RADIO UNO:** daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute ok elsendoj pri diversaj temoj.

**Ĝeneralaj informoj: TEA-Bulteno** - senpaŭze la ses-paĝa asocia informilo aperas ĉiun duan monaton. **Estrarkunsidoj:** dum la jaro oni kunsidis 4 fojojn. **Korespondado:** en papera versio estis ricevitaj 10 leteroj kaj senditaj trideko; retaj mesaĝoj senditaj/ricevitaj: 267, kiuj troviĝas en KD en la rilata ujo pri „Korespondado 2015“ kaj entute estis pretigitaj 191 dokumentoj kiaj afiŝoj, broŝuroj, aliĝiloj ks.

Elda Doerfler

## Atentigo!

Estas tempo renovigi vian membrokotizon al TEA. Memoru, ke tre gravas via helpo por la plua ekzisto de Triesta Esperanto-Asocio, kies ĉefa celo estas la diskonigo de nia komuna lingvo Esperanto. Eblas pagi rekte al la kasisto en la sidejo kaj ni tre ĝojos pro via vizito! Alia ebleco estas pagi pere de banko: vidu la informon en la antaŭlasta paĝo. La kasisto peras ankaŭ abonojn al ĵurnaloj, revuoj, gazetoj, membrokotizojn de UEA, FEI kaj aliaj. Dankon pro Via subteno!

TEA-estraro

## Kiam ekfloras la migdalarbo...

Temas pri libro eldonita enkadre de projekto, titolita "La patrino lingvo, je la radikoj de l' identeco", pri kiu Triesta Esperanto-Asocio okupiĝas jam de jaroj: tio estis ĝia kontribuo

al subteno de la dialektoj, niaokaze tiu de la triesta.

La 21<sup>a</sup> de februaro estas dediĉita al respekto kaj subteno de la lingva kaj kultura diverseco tra la mondo. La Internacia Tago de la Patrino lingvo, deklarita de UNESKO en 1999, havas la celon rememori pri ĉies precipa devo klopodi al

la konservado de plurlingvismo kaj plurkultur-eco. La elekto de UNESKO dediĉi tagon al tiu ideo, estas ligita al la tragedia evento, okazinta en la iama orienta Pakistano, nun Bangladeŝo, februare 1952, kiam la polico mortigis

homojn, manifestantajn por la rekono de la bengala kiel oficiala lingvo.

En 2000, kiam unuafoje oni celebris la Tagon de la Patrino Lingvo, la ĝenerala sekretario de UNO, Kofi Annan, rekomendis al ĉiuj popoloj konsciiĝi pri la valoro de la lingvoj kaj, substrekante la gravecon konservi la lingvan diversecon, alvokis ĉiujn pli firme gardi la mondajn idiomojn kiel komunan, tuthomaran heredaĵon.

Tial "ekfloris" nia libro, kies enhavo arigas 26 poemojn, verkitajn de sep aŭtoroj en la triesta dialekto kaj tradukitajn Esperanten de temo konsistanta el Edvige Ackermann, Elda Doerfler kaj Anita Perić Altherr.

La libro aĉeteblas en la librejo LUGLIO, Galleria Rossoni aŭ en la TEA-sidejo. La kosto egalas al € 12,00 (plus - eventualaj - sendoelspezoj).



## La Konkursoj de Samideano

Revenas "Poezio el ĉiuj ĉieloj", konkurso starigita de la itala samideano Giuseppe Campolo, kun la subteno de la komunumo Sankta-Anĝelo de Brolo (Mesino - Sicilio).

Rajtas partopreni ĉiuj poetoj de nia planedo, per poeziaĵoj en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj. Oni devas sendi retpoŝte (en word-formato) al [samideano@hotmail.it](mailto:samideano@hotmail.it) nur unu poeziaĵon, ne pli longan ol kvindek versoj.


La verkoj devas esti neeldonitaj kaj neniam premiitaj antaŭe. La tuta anonco kun la aliĝilo estas akirebla ĉe <http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoPoemojIII.html>

La ĉi-jara konkurso riĉiĝas per nova fakto: "Romanoj el ĉiuj ĉieloj", verkoj tradukitaj en Esperanton el ĉiuj ajn lingvoj. La anonco aperas ĉe <http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoRomanojI.html> La premioj konsistas en mono, platoj kaj libroj. La premiada ceremonio okazos en la komunuma Teatro en Sankta-Anĝelo de Brolo (Sicilio, Italio), la 18<sup>an</sup> de oktobro 2016, je la 18<sup>a</sup> horo.



## Laste trovitaj!

En decembro 2009, aperis en Germanio serio da poŝtmarkoj, tiel diritaj 'individuaĵ' aŭ 'personigitaj', memore al "La Kvaro por la Kvaro", nome la organizantoj de la 4<sup>a</sup> UK okazinta en Dresdeno (1908). Sur ĝia bildo troviĝas la foto de tiu Kvaro, konsistanta el Marie Hankel, Heinrich Gustav Arnhold, Albert Schramm kaj Eduard Mybs.



De M. Hankel (1844-1929) aperis en TEA-Bulteno (Jan.-Febr. 2015) poeziaĵo: "La simbolo de l' amo", gajninta la unuan premion ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj. Ŝi fakte famiĝis kiel la unua E-poetino de la mondo, sed envere plimultvalora estis ŝia agado favore al Esperanto: kunfondinto de la unua Dresdena E-Grupo, kunorganizanto de la 4<sup>a</sup> UK, instruistino k.a.

Nun ni eksci ion pli pri la aliaj personoj. Ekzemple pri d-ro Eduard Mybs. Scivolemo puŝis min serĉi pluajn informojn pri li, tuj post la akiro de tre malnova bondezirkarto (1909), sur kiu li stampis sian nomon.

Li naskiĝis en 1858 en Altona, iama Prusujo, kie li mortis en 1923. Pri li bele parolis Felix Epstein, kiu estis - depost 1906

- lia sekretario kaj akompananto: "Estis la 19<sup>a</sup> de majo 1904, kiam kelkaj interesuloj pri la demando de la Internacia Lingvo kunvenis, por diskuti kaj propagandi tiun ideon. Inter tiuj troviĝis ankaŭ d-ro Eduard Mybs, antaŭe fervora Volapukisto, kiu danke al siaj lingvaj fakonoj kaj sia verva simpatia bonhumoro igis, ke tuj estu fondita la Esperantista Grupo Hamburg-Altona.


E. Mybs startis per vigla agado, ekkorespondis kun samideanoj el ĉiuj mondopartoj kaj ankaŭ kun d-ro Zamenhof, tiel ke kiam li ĉeestis en 1905 la 1<sup>an</sup> Uk-on, lia nomo estis jam vaste konata. Okaze de la 2<sup>a</sup> UK en Ĝenevo li raportis pri ĝi en la Hamburga gazeto: tiu artikolo estis la instigo por ke mi eklernu la lingvon. D-ro Mybs estis tiam membro de la Lingva Komitato, Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, prezidanto de Germana E-Asocio kaj de la Hamburga Grupo: tro ŝargita de tiom da laboro, li dungis du sekretariojn, la francon René Ladevèze kaj min. Preskaŭ ĉiun dimanĉon li propagandprelegis en la najbaraj urboj, gvidis kursojn kaj publikigis multajn artikolojn..." El ĉio ĉi oni devas agnoski ke li estis tre iniciatema kaj aktiva esperantisto!

Heinrich Gustav Arnhold (1885-1935) estis

juddevena germana esperantisto, filo de Georg Arnhold<sup>1</sup>. Li estis bankisto kaj d-ro pri juro.

Lia patro kun sia frato Max fondis la plej grandan privatan bankon en Saksujo, al kiu li aliĝis kiel partnero pli poste, en 1910.

Kun Esperanto li konatiĝis en 1907, post kiam li estis partopreninta kun sia patro en la 16<sup>a</sup> Universala Kongreso de Paco, en la bavara Monako, kie li renkontiĝis kun Bertha von Suttner<sup>2</sup>. Estis ĝuste ŝi, kiu lin instigis lerni Esperanton. Lia instruistino estis Marie Hankel. Lia kariero kiel esperantisto komenciĝis ekde ... tuj, ĉar H. Arnhold estis envolvita en la organizado de la Dresdena UK. De 1911 ĝis 1914 li estis prezidanto de la 1<sup>a</sup> Saksa E-Asocio, ekde 1912 kasisto de la Germana Federacio, membro de la Lingva Komitato, honora membro de UEA, verva propagandisto. Li eĉ enkondukis la lingvon en sian bankon (por kreditleteroj, formularoj, korespondado). Danke al sia grava posteno li havis kontaktojn kun multaj aŭtoritatuloj, akirante tiel plurajn avantaĝojn favore al Esperanto.



Pro la komenciĝanta persekutado de la judoj li komencis batali ankaŭ leĝe kontraŭ naziismon: li tiom multe suferis pro tiu kaŭzo ke sekve de apopleksio Heinrich Arnhold frumortis en 1935. Lia tuta familio bonŝance saviĝis, ĉar ĝi sukcesis elmigri unue al Svislando, poste al Portugalio, Brazilo kaj

fine Usono.

Kaj nun la Kvaro de la Kvaro: d-ro Albert Schramm (1880-1937). En la universitato de Tübingen li studis protestantan teologion kaj funde okupiĝis pri stenografio kaj ĝia historio. De sia naskiĝurbo Sindenfingen, li translokiĝis al Dresdeno, kie li eklaboris kiel parlamenta stenografiisto kaj bibliotekisto ĉe la Saksa Stenografa Instituto. Li estis eminenta fakulo pri ĉiuj aferoj rilataj al libroj, presado, ilustrado, skribo ktp. De 1913 ĝis 1928 li estis direktoro de la Germana Muzeo pri Libro kaj



Skriboj en Leipzig. En 1929 li fondis kaj ekstris Bibliotekistan Lernejon. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li denove loĝis en Tübingen. Dum la 4<sup>a</sup> UK li havis la taskon de vicprezidanto. En 1908 li kunfondis la Saksan E-Instituton, kies direktoro li estis ĝis 1914. A. Schramm estis ĉefkunlaboranto kaj poste redaktanto de la gazetoj

Ĉirkaŭ la Mondo, La Bela Mondo kaj Universo: ĉi du lastaj estis prave konsiderataj la plej belaj, artaj, luksaj esperantaj magazinoj tiutempaj. Krom ĵurnal-artikoloj, li verkis ankaŭ lernolibrojn, unu el kiuj aperis en 1923 en sia 31<sup>a</sup> eldono.

Atingita estas la fino de la prezento de ĉi kvar eminentaj germanaj geesperantistoj, kiuj gajnis honoran lokon en la Panteono de la meritoplenaj Esperanto-pioniroj de nia movado.

Notoj:

<sup>1</sup>Profesie bankisto, komerca konsilisto, unu el la gvidaj ekonomiaj fakuloj de Germanio. Eminentia pacifisto kaj esperantisto.

<sup>2</sup> Bertha von Suttner (1843-1914), aŭstra pacifistino kaj verkistino, ricevis la Nobel-Premion pri Paco en 1905. Fontoj: EdE; Vikipedio; arkivo de ED

### Bonvenon al la 44<sup>a</sup> Malferma Tago!

Sabaton la 30<sup>an</sup> de aprilo, en la sidejo de UEA, okazos tri prelegoj pri la temo: *Kion oni lernas planante sekretan lingvon en bazlernejo?* Federico Gobbo prezentos dujaran eksperimenton en itala lernejo, dum kiu infanoj lernis principojn kaj praktikojn de (inter)lingvistiko. Anna Löwenstein parolos pri siaj "malantaŭkulisaj" spertoj rilate al la kreado de la Esperanto-retkursoj ĉe Duolingo kaj lernu.net. Renato Corsetti proponos: *Samideanoj kun malsamaj ideoj - pensofluo en la Esperanto-movado.*

Gazetaraj Komunikoj de UEA - N-ro 603

### Cerbotikilo 6?

Solvo de la kvizo de Viglo, aperinta en la pasinta TB. Jen la ses vortoj akireblaj per enŝovo de la silaboj de la vorto

### LIVERI

post la unua silabo de la donitaj vortoj:

**ALIĜO BARILO BREVETO  
KALIFO ORIFICO SEVERO**

Mi ege bedaŭras, kaj certe ankaŭ nia Viglo bedaŭrus, ke neniu kapablis aŭ ne emis sendi la solvon. Nu la premio restos je dispono de la ontaj cerbotiklemuloj!

### Grava Informo al la Asocioj

Eblas pagi la renovigon de la membrokotizo al **UNICREDIT**, titolita al ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA via del Coroneo 15 - 34133 TRIESTE

**IBAN:**

**IT 53 U 02008 02242 000102990439**

**Koran dankon!**

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**

**Redaktanto:** Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

**Sidejo/Poŝta adreso:** Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

**Kunventagoj:** marde 17-20; vendrede 19-21

**Tel:** (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

**Banka Konto:** Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

**Retoj:** esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

**Asociaj ttt-ejoj:** www.tea1906.altervista.org;

www.karstajtagoj.altervista.org

### Marta Programo

1a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
4a, vendredo	20h00 - 8-a de marto TAGO DE VIRINOJ - Esperanto-Virinoj en nia Literaturo
8a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
11a, vendredo	20h00 - Legado de la "Historio de la Esperanta Literaturo"
15a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
18a, vendredo	20h00 - Babilado
22a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
25a, vendredo	20h00 - Bildoj por lerni
29a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo

### Aprila Programo

1a, vendredo	20h00 - El la E-gazetaro
5a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
8a, vendredo	20h00 - Legado de la "Historio de la Esperanta Literaturo"
12a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
15a, vendredo	20h00 - Antaŭ 99 jaroj mortis Lazaro Ludoviko Zamenhof
19a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
22a, vendredo	20h00 - Trafoliumante PIV-on
26a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
29a, vendredo	20h00 - Esperanta televido

La franca Esperanto-kastelo Grésillon invitas vin lerni kaj ferii.



2016-apr-08/16: PRINTEMPaS, intensivaj **kursoj** kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

[gresillon.org/printempas](http://gresillon.org/printempas)

2016-apr-20/24: **Korusa** renkonto de *Interkant'* kaj

**verkadateliero Krajon'-Ankr**

[gresillon.org/koruso](http://gresillon.org/koruso)

2016-jun-12/17: La Luaro laŭ la vortoj, **turisma** semajno laŭ verkistoj [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

2016-jul-04/15: Dektaga kurso pri la esprimo de la **tempo** en Esperanto [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

2016-aŭg-06/13: SOMERAS, la Esperanto-**studad**-semajno post FESTO [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

2016-aŭg-21/28: Festa semajno por **infanoj**, adoleskantoj kaj familioj [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-2.41.89.10.34, [gresillon.org/kontakto](http://gresillon.org/kontakto)

# *Uno per tutti ... cinque per mille!*

## **AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO**

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina  
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che  
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2015 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

**90012340320**

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale  
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Il Presidente

*(Edvige Ackermann)*

---

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320